

bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXI

SOFIA, 25 APRILO 1940



NI NE DIVIDU NIAJN FORTOJN!

La esperanto movado estas idea movado. Ĝi tute ne similas al multaj aliaj movadoj, kiuj portas al siaj membroj materialajn profitojn. Tiuj profitoj estas ĉefaj kaŭzoj kiuj rezultigas la multnombregon de tiaj organizaĵoj. Ni bedaŭrinde devas konstati ke nuna militsituacio en kiu troviĝas la eŭropaj ŝtatoj (la plej grandaj el ili) tute ne favorigas la ideajn movadojn. Malgraŭ tio, kiam ni legas la esperantan gazetaron, ni vidas ke la informoj pri nia movado ne estas tiel malkuraĝigaj. Kion ni faru? Ĉu ni malesperigu? Ĉu ni atendu fini la militon kaj tiam komencu aktivan agadon por la triumfo de nia ideo? Ni pensas ke ankaŭ nun, malgraŭ ĉiuj malfavoraj kondiĉoj, ni ne devas ĉesi nian laboron kaj nian agadon. Ni vidas ke en iuj ŝtatoj (ekz. Nederlando) niaj samideanoj fervoraj malfermis esperantokursojn por la mobilizitoj. Tio pruvas ke eĉ la milito ne povas ĉesigi la idean laboron de la arduloj. Des pli en landoj, kiuj estas ankoraŭ malproksime de la milito, tiu agado ne devas ĉesi por unu momento.

Sed por ke nia propagando estu sukcesa, ni devas esti unuigitaj, ni tute ne devas dividi niajn fortojn, kiuj ja ne estas tiel grandaj kaj solidaj. Tio koncerne precipe la movadon en malgrandaj ŝtatoj kiel la nia. Bedaŭrinde ni devas konstati ke tiu unueco ne ĉiam ekzistis kaj ekzistas en niaj vicoj. Unu lasta, prava kaj in-

struiga ekzemplo por la divido de niaj malgrandaj fortoj estas la samtempa eldono de *du albumoj — adresoj* de bulgaraj esperantistoj. Sur aliaj paĝoj de „Bulgara esperantisto“ ni donas recenzon por la albumoj. La kompetenta kritiko de samideano Cydra estas objektiva kaj senpartia. Ĉi tie ni nur volas konstati ke tio ne devis okazi. Se la du eldonintoj — samideanoj Dim. Ivanov el Ruse kaj Belĉo Todorov Oktomvrijski el Sofia povus interkompreniĝi, se iliaj fortoj estus unuigitaj kaj ne devus esti dividataj, ni estas certaj, ke la rezulto estus tute alia. Mi nun volas turni la atenton de ĉiuj bulgaraj esperantistoj pri tiu fakto kaj ni ĉiuj havu antaŭ siaj okuloj la instruon de la bulgara proverbo: „Unuigita anaro monton levigas“.

Mi montras la eldonon de du albumoj kiel ekzemplo por divido de niaj ne tiel grandaj fortoj. Per tio mi tute ne volas malesperigi niajn samideanojn, ĉar en nia asocia vivo estas tute kontraŭaj esperigaj simptomoj de unuigo kaj sukcesplena laboro. Tia estas ekzemple la granda kaj plena *esperanto-bulgara vortaro*, laborita de nia bona samideano Atanas Nikolov en Sevlievo, reviziita de Emil Stratev kaj Ivan Sarafov. Tiu vortaro vere estas granda kaj plena kaj efektive estas bezona por la bulgara esperantistaro. Ĝi estas multe pli komplekta kaj ampleksa ol la vortaro de Har. Băčvarov, kiu ja estas jam bibliografia maloftaĵo. Nia movado jam

delonge bezonis tian vortaron. Ĝi devis aperi antaŭ multaj jaroj. La plej bona kvalito de la nova vortaro estas en la fakto, ke ĝi ne estas simpla vortaro, sed unu malgranda enciklopedio. Multaj vortoj estas detale klarigitaj kaj la samideano, kiu uzos ĝin, ne bezonos vortarojn de fremdaj vortoj en la bulgara lingvo. La vortaro de Nikolov, mi devas konstati ĝoje tion, pravas, kion povas fari la unuigitaj fortoj de kelkaj samideanoj. Ni atendu, ke tiu vortaro aperos ne post longa tempo kaj ke la bulgara esperantistaro subtenos plezure la entreprenon por ke ĝi povu liveri al nia an-

koraŭ malriĉa bulgara esperanto-literaturo novajn seriozajn librojn. Ni substrekas ke ĝis nun en nia lando ne ekzistas esperanto eldonejo rimarkinda. Ni esperu ke tia eldonejo naskiĝos ankaŭ en nia lando ne ekz. kiel „Literatura mondo“ en Budapeŝto, multe pli modesta, sed bone funkcia. Do, ni donu nian subtenon por kreo de tia entreprenon! Tion ni atingos nur per la kunigo de ĉiuj niaj fortoj. Pro tio ni devas ripeti ĉiumomente kaj al ĉiu nia samideano la grandan instruon de la suprecitita bulgara proverbo pri la unuigo de homaj (en nia senco-samideanaj) fortoj.
S.

DIMITR PANTELEEV

ARBHAKISTO

Arbar', kaj tra l'arbar' silente
sonĝpaŝas arbhakistoj grandaj
kun haroj grizaj kaj velkantaj —
fleksitaj trunkoj de la vento.

Kaj lasta mi, kaj lasta mi-ilia
malluma, nekonata filo
post ili kuras, saltas, krias,
surbrakiginte la hakilon.

Auuuu . . . ekmuĝas nigraŭtuno,
auuuu . . . sin ŝetas la platanoj,
kaj tra l'arbar' ekportis sin maljuna
furia vent' — miljara blindtitano.

Kaj ŝajne de la mondo-kreo
min ekpelinta estas pluv'kaj vento,
kaj nur meznokto savas de l'pereo —
kabano min renkontas kun lamento.

Renkontas min pri forta dorm'sonĝante,
kaj jen atendas mi la dian nokton,
ke lacon en okulojn surverŝante
ĝi tuj faligu min surteren morta.

Traduko de *Iv. Dobrev*

Dimitr Pantelev, bulgara poeto, nask. dum 1901 en Sofia, kie finis gimnazion. Estas membro de la Unuigo de a bulgaraj verkistoj. Li estas aŭtoro de

Arbaro, kaj en sonĝ-silento
hakistoj marŝas tra l'arbaro,
kun velkaj jam kaj grizaj haroj,
fleksataj kverkoj sub la vento.

Post ili, jen post ili kun persisto
kaj en silent' iliajn spurojn
surbrake kun hakilo mi postkuras,
sennoma filo de la arbhakistoj.

Au-u-u-u aŭtuno nigra hurlas,
au-u-u-u skuiĝis arbopintoj,
kaj tra l'arbar' subite blinde
miljara ŝtorma vent' ekkuras.

Mi iras, akvo ankaŭ vent' severa
min pelas kvazaŭ de pratemp' senĉese,
kaj sur vojet' dezerta nur noktmeze
renkontas min kaban' mizera.

Renkontas min, al peza dorm' invitas,
kaj jen atendas mi la nokton dian
por verŝi lacon en okulojn miajn,
faligi min sur plankon disbatita.

Traduko de *Miti*

jenaj versaĵaroj: Ponto (1923) Pafisto (1924) Arbhakisto (1928) kaj Fenestreto (por infanoj, 1933).

NIKOLAJ RAJNOV

SFINKSO

Viaj ŝtonaj okuloj estas skribotabuloj de la tutmonda memoro — vi memoras multkolorajn festojn de sango kaj preĝado: milojn da reĝoj postvivis via marmora rigardo, centjaroj superŝutis per cindro viajn stonajn paŝojn.

Festo ludas en via rigardo, ho atestanto de la sunleviĝo: centjara festo, kies sonoj ankoraŭ ne estas surdiĝintaj, bruegas en la silentado de via senmova vido.

La homo staras antaŭ vi, Sfinkso!

— — —

„Ne venas mi rigardi la Miraklon de homa mano, kiun la centjaroj faris famekonata, nek miri antaŭ la Sekreto de homa imagokapablo, kiun la popoloj glorigis.

„Sfinkso, mi ne volas vian Sekreton!

„Mi scias eĉ tion, kion vi ne scias...

„Ĉe vi mi venas kiel ĉe mia naskitaĵo, ĉar antaŭ jarcentoj mia penso skulptis la Miraklon de via korpo: mano mia enĉizis en ŝtona Enigmo la kvaropan Miraklon, kiun oni nomas Homo: min mem mi enmasonis en skulptaĵo de ŝtono kaj cemento — kaj tiu skulptaĵo postvivis eĉ sian kreinton.

„La homo staras antaŭ vi, Sfinkso!

— — —

„Ni estis miloj antaŭ jaroj — kaj forteĝaj ni estis — kaj fiero sonoris en nia rigardo. La Suno rebrilis sur la bronzo de niaj korpoj — kaj la turnovento sin kaŝis en la mallumo de niaj hararoj.

„Sed la briladon de fierulo ni ne havis — liberon ni ne havis. Ĉar sklavoj estis ni ĉiuj — kaj neniu povis eviti la frapbruon de estra vipo.

„Kaj unu tago disportiĝis krio:

— „For la ĉenojn! Libervolo por ĉiuj homoj!

„Kaj ni voĉdaŭris la nekonatan krion, kiu promesis al ni ĉielojn.

„Kaj ni ĉiuj ekribelis.

Neniu volis obei al faraono, pastro aŭ terkulturisto. Kaj ĉiuj ni forlasis la urbojn

kaj la vilaĝojn, — ni iris loĝi meze de la oazoj de la Dezerto.

„Kaj tie ni etendis tendojn, multobligis kamelojn kaj plugis teron. Kaj la estroj sendis kontraŭ ni militemajn falangojn — por timigi nin per glavo, — ke ni revenu.

„Sed ni estis sennombraj — kaj per manoj ni rompis iliajn halebardojn, kaj la pinto de la glavo rompiĝis, kiel junko, kontraŭ la bronzo de niaj brustoj. Kaj la atakintoj timeme flugrapidegis malantaŭen — al siaj urboj.

„Miloj ni estis antaŭ jaroj — kaj fortaj ni estis — kaj fiero sonoris en nia rigardo. La Suno rebrilis sur la bronzo de niaj korpoj — kaj turnovento sin kaŝis en la mallumo de niaj hararoj.

„Kaj en la movo de niaj brakoj portiĝis la brilado de fierulo, ĉar liberecon ni akiris. Neniu estis sklavo — kaj neniu povis timigi la feran sibladon de estra vipo: ni estis libervolaj kiel turnoventoj.

„Kaj travivinte la sentencon de niaj tagoj, ni kunvenis en la Dezerto, — por elmasoni de cemento kaj ŝtono monumenton de nia faro: la Sfinkson ni elmasonis.

„En la trajto de premiĝintaj lipoj ni entranĉis la mokrideton de memreganto, kiu tra doloroj kaj klopodo atingis libervolecon, ne timanta Malfeliĉon, kaj malŝatanta ĉian Feliĉon.

„En grandkreskaj leonaj brakoj kaj en akraj ungoj ni enajlis la fortecon de libervolulo, kiu kuraĝmove disbatis unu regnon — kaj kiu estas preta ruinigi elfunde unu universon.

„En la glacia rigardo de l'homa vizaĝo kaj en pensoplenaj trajtoj de la kranio ni fermis potencon penson de sendependa saĝo, kiu interpretas la kunplektaĵon de teraj kaj ĉielaj projektoj.

„En la soleneco de lia mieno kaj en la grandeco de lia senmoveco ni enĉizis la eternecon de la homa Spirito — kaj ni, eternaj maldankemuloj, enmetis en lia figuro la Enigmon kiun neniu tempo malkovros.

— — —

„Kaj jen nia granda peko: ni kunvivis la Enigmon de la malnova tempo. Sensaĝan penson nutris ni: — ke al ni mankas nur libervoleco. Kaj akirinte ĝin, ni komprenis, — ke ni nenion havas.

„Ne estis ni al kutimiĝintaj je libervola vivo — kaj reciproke ni demandis nin, kion ni devas fari. Kaj neniu respondis. Jen ni komencis pereigi unu la alian kaj interbatali pri virinoj kaj tero.

„Kaj komprenis ni, ke pli facile estas obei ol ordoni. Ĉar la justeco ne trovis ordonanton inter ni: kaj ĉu ne ni evitis ordonantojn?

„Kaj ekmarŝis ni en returna vojo al la urboj por vendi nian liberecon. Sed la faraonoj estis mortigitaj, la pastroj — mortintaj, kaj fremduloj estis forprenintaj en sklaveco niajn estrojn.

„Kaj tiam dissemiĝis ni kiel sablo: unuj estis mortigitaj, aliajn oni kaptis, triaj ekloĝis en urboj kaj vivis per rabitaĵoj.

„Ni mortis — la sklavoj de la libereco, — kaj de nia kuraĝa revo restis nur figuro. Restis la fiera Sfinkso, kiu proklamas al la mondo la impulson de malica Sensaĝeco.

El „Sunaj fabeloj“.

„La skulptaĵo postvivis la homon.“ —

Vi staras, aŭskultanta legendon de antikvaj tagoj, ĉar la malnova Enigmo estas klarigita — kaj viaj okuloj estas malplenaj. La indifirenta rideto de viaj lipoj parolas nur glacian mokon: la granda Sekreto de via rigardo estas Sekreto enterigita!

La homo mem enterigis ĝin.

Sed novan enigmon vidas mi brilantan en la faldo de via premiĝinta buĉo — kaj nova Vero sulkigas la trajton de via kranio.

Via scias tion, kion eĉ mi ne scias...

Vi estas trarigardinta la senfinan vojon de la Homo, kaj la centjaroj estas enverŝintaj vivon en viaj mortaj membroj. Vi konas la testamenton de la pasinto kaj ĉiujn justecojn de la estonteco.

Vi scias tion, kion eĉ Mi ne scias. . .

Kaj inter ĉio, kion vi scias, mi nur unu scias — vian mokon.

Kantisto staras antaŭ vi, Sfinkso!

El la bulgara tradukis S

NIKOLAJ RAJNOV

Sango sur la folioj

Ĉu vi memoras, mia malproksimulino, la malfruan horon, kiam mi vidis vin unuan fojon?

Ĉu vi rememoras la odoron de maturiĝinta vinberaro kaj la multkolorajn purpurojn de Izmir'a duontago?

Sur la grandaj stratoj de Izmir'o nigraj homoj vendadis fruktojn en larĝaj korboj. Viroj kaj virinoj en diverskoloraj vestoj aĉetis vinberaron, kokosajn nuksojn kaj muskiĝintajn persikojn. Sur la ŝultroj de la vendistoj saltadis simioj kaj ludis per iliaj turbanoj. La suno konturis rompitaĵajn ombrojn ĉe la anguloj-kaj la tuta strato pleniĝis je koloroj.

Kaj vi staris tie, inter multaj, en via longa nigra vesto — kaj la silkaĵo de viaj

okuloj etendis ombron sur la silkon de via vestaĵo.

Viaj palpebroj estis malsekaj pro tutnokta ĝuo, kaj viaj brovoj estis pezaj kaj longaj kvazaŭ flugiloj de stranga orienta birdo.

Via granda ĉapo ĵetis viglan ombron sur vian vizaĝon — kaj en la ombro brilis kiel furiozaj flamoj viaj okuloj.

Vi ekrigardis min — kaj vidon haltis mi sur vin. Kaj vi okulojn turnis — kaj en via rigardo mi tralegis, ke okaze ni interrenkontis nin, sed nur morto malunuigos nin: tralegis mi la eternan trompon, ke unu por alia ni estas naskiĝintaj.

Ĝiu legas multfoje dum sia vivo tiun trompon — kaj ĉiu diras al si:

— Nun ne estos tiel!

Ĉu vi memoras, mia malproksimulino, kiel pasis la unua tago?

Ĉu vi memoras fajrego de brilega suno kaj la dolĉtrankvilon de longaj lumplenaj stratoj?

Vi rakontis al mi nome tiam — virino kaŝas de neniuj siajn multkolorajn tagojn — pri via infaneco en la oazoj de la araba dezerto kaj pri la fruaj jaroj de via junulineco.

La suno estas karesinta vian nudan korpon — kaj malforta vento estas ĉirkaŭpreninta viajn serpentosimilajn femurojn.

Vi vivis en la ombroj de tendo kiel en lulilo — kaj patrino via ne estas pensinta, ke iun tagon blankulo ĉirkaŭprenos vin.

Kaj vi rakontis al mi, kiel poste en la haremo de fama princo vi estas vivinta sub lumo multkolora de silka baldakeno — kaj kiel vi per citrono malsekigis vian buŝon, por ke ne ekkaptu vin varmega voluptemo.

Ekamis vin blankulo, kiam vi vizaĝon vian montris el fenestro — kaj tra sango li portadis vin surbrake, por alporti vin en Izmir'on.

Kaj tie ĉi, en infera bruego de la stratoj, vi forgesis la dezerton por ekami la sennoman svarmon de l'amasoj.

— — —

... Kaj trapasante ni ambaŭ apud la tombejo de la pilgrimintoj, dormantaj sub la ombro de senvoĉaj cipresoj, vi diris al mi, ke tie por unua fojo ĉirkaŭprenis vin la blanka homo el Okcidento.

Kaj kiam ni rigardis longan karavanon de kameloj apud la malnovaj fontoj, masonitaj de marmoro kaj sablaĵo, vi kuŝis sur la herbo — dirinte ke vi estas laciĝinta. . . .

Tiam mi vidis ombron retiĝantan antaŭ viaj okuloj — kaj vi ekstremis, kaj miaj brakoj vin levigis por subteni vin. . .

Kaj longa karavano tiriĝis denove — kaj la maljunaj turkoj rigardis nian ĉirkaŭprenon kaj ridis kiel infanoj.

— — —

Ĉu vi memoras, mia malproksimulino, la multkoloran nokton de Izmir'o? Ĝi estis bela kiel korpo de nuda virino.

La golfo brilis kiel ora hufofero, forĵetita de grandega ĉevalo — kaj forge-

sita en la maro. Dumfestaj ŝipoj naĝis en la mallumeco kaj ŝetadis ruĝajn, helajn kaj verdajn serpentojn sur la akvon el siaj koloraj lanternoj.

Kaj la urbo kunplektadis siajn mallumajn stratojn kiel nigraj zigzagostrekoj de persa tapiŝo — kaj homoj moviĝadis kaj balancis malgrandajn lumigilojn.

Purpuraj arkoj rompiĝis el angulo en angulo — kaj trans ili pasadis longaj ombroj de virinoj kaj viroj.

Vi eniris en malluman domon kun fera pordo, kaj la tenilo de la pordo similis je serpenta kapo.

Laŭlonge de la tuta strato zigzagis altaj nigraj konstruaĵoj. Kaj en la ombroj ĉe la anguloj kaŝis sin ombroj de soligintaj virinoj, kiuj serĉas viron. . . .

Mallaŭte vi surfrapis — kaj negro malfermis la pordon por enlasi nin. Kaj poste la peza pordo fermiĝis sin sola. Kaj mi eniris supren, en la luma ĉambro de via feliĉo — kaj vidis mi tiun, kiu alportis vin per sangigitaj brakoj ĝis Izmir'o.

Sed laciĝinta vi estis kaj lin ne ekrigardis.

Kaj lia buŝo faldiĝis en maldolĉa streko, kaj en okuloj liaj luman flameton mi vidis. Tiam vi eliris, kaj ni ambaŭ restis.

Kaj fiksrigardis mi lian malgrasan vizaĝon. Unu dika vejno maltrankvile tranĉkovris lian kranion. Liaj senfortaj makzeloj memorigis vizaĝon de sovaĝulo, sed en liaj okuloj estis tiom da saĝo, ke mi vidis min kiel infano antaŭ li.

Lipoj liaj tremis: maldikaj kaj palaj ili estis kiel skulptaĵo de eburo.

En la facila movo de liaj brakoj rimarkiĝis lerteco de bestobeiganto, kaj en la tremado de lia korpo estis tiom da sufero, ke mi kompatis lin.

Kaj li diris al mi (vi ne scias tion) —:

„Mi eltiris ŝin tiele, kiel oni eltiras leoninon el la kaŝejo de nubi'a*) leono. Milo da sovaĝbestoj timtremas antaŭ mia vipo — kaj siblas — kaj minacas — kaj forkuras antaŭ la fajro de mia rigardo. Per okuloj mi dormigas krotalojn, serpentojn kun okulvitraj signoj, nigrajn afrikajn aspidojn. Sed *Ŝin* — — *Ŝin* mi

*) Nubilando — inter Abisenlando kaj Egipto (R. T.).

ne povis obeigi: Venkis min *Ŝi* — kaj timas mi, ke iun tagon *Ŝi* disŝiros miajn vejnojn — kaj iu fremdulo vidos en sango mian korpon . . .“

— — — —
Ĉu vi rememoras, malproksimumo mia, la horojn de malfrua nokto?

Kiel tremado de malsanaj membroj pasis la momentoj.

Tie, en la lumoplena ĉambro de via feliĉo, sidis ankoraŭ mi — kaj rigardis du personojn interbatalantajn kun neegalaj fortoj.

Ni, la tri, parolis pri Virino — kaj vi ambaŭ interĵetis unu al alia rigardojn, pro kiuj sur mia korpo ŝprucis glacia akvo . . .

Apud vi fleksis beltalia korpo nigra pantero, — kaj korpo via volviĝis fiere dum ĉiu movo — kaj vi superis la panteron! . . .

Poste mi kun li trinkis malvarman vinon kun moka*) kaj bananoj, kaj vi ludis je harpo.

Kaj en via kanto kunmiksiĝis la teruraj vertebroj de hinda serpento, kaj en via rigardo siblis veneno de eterna Virino.

Mi vidis — — — .

Ankaŭ li vidis — kaj ekkomprenis, ke depost tiu momento li sola devas vivi.

Kaj li forgesis, ke mi estas tie — kaj li ekrigardis vin tiele kiel dumtage li estas rigardinta la sovaĝajn leopardojn, — jen li ekmovis manon, kvazaŭ premante en ĝi vipon, trapenetris vin per rigardo kaj diris potence:

— Mi ne cedos min al Vi! Sangon mi verĉis pri Vi! Vi promesis, dum la kuraĝaj momentoj de danĝero — sekvi ĉiun movon de mia brako! Vi devas resti fidela!

Kaj vi ekridis — ĉu vi rememoras, malproksimumo mia? — vi ekridis, levigis vian fieran korpon, ĉirkaŭprenis la panteron — kaj eliris.

— — — —
Kaj li falis sur la veluran liton — kaj kovris per mano sian vizaĝon.

Kaj kiam unuaj sunradioj trapenetris la kurtenojn, mi leviĝis, sed vi ne estis tie, kaj li nenion vidis.

Per delikata ektuŝo surŝultren mi ve-

*) moka — araba kafo.

kigis lin kaj li leviĝis — rektiĝis, — sed ne ekkonis min.

Vizaĝo lia estis sulkigita kiel vizaĝo de mortigita homo, kaj en liaj okuloj estis larmoj . . .

— — — —
Kaj, la sekvontan nokton, ĉirkaŭprenante vian nudan korpon mi sentis timon — kvazaŭ mi danĝeran beston ĉirkaŭprenas. . .

— — — —
Iun matenon mi eniris en la malluman domon. La negro malfermis al mi la feran pordon — kaj ĝi sola fermiĝis post mi.

Ĉambro via estis ŝlosita.

La nigra homo silente montris al mi la grandan ĝardenon.

Mi malsupreniris la ŝtupojn — kaj la pantero per malbrujaj paŝoj min atingis. Ĝia unu okulo estis sangigita, kaj sur ĝia dorso vidiĝis makuloj, bruligitaj per fera vergo.

Mi trapasis la blankan ŝtuparon de fendiĝinta marmoro kaj atingis en la ĝardenon.

Neniu estis tie.

Grandkreskaj cipresoj ĉagrene levis supren altajn trunkojn kaj iliaj grizaj folioj balanciĝis kiel hararo de mortinta virino. . .

Mi haltis ĉe la rando de l'ĝardeno kaj rigardis ĉirkaŭen.

Post mi staris la nigra homo, kaj la pantero per flekseblaj movoj karesis sin je mi.

Mi returnis kaj demandis la negron, kie vi estas.

Li silente montris al mi la cipresojn. Mi alproksimiĝis. . .

Sur iliaj folioj estis sango!

En la sablo estis ankoraŭ rimarkebla sanga larĝa marĉeto.

Sur la tero estis videblaj strekoj — kvazaŭ fortaj fingroj de viro desegnis la sablon dum morthoro . . .

— — — —
La vesperon denove vi venis ĉe mi. Mi ekrigardis vin per terurigitaj okuloj, kaj vi malantaŭeniĝis — kaj fiero estis en via ekmo.

Nia paradizo daŭris nur unu nokton la nokto antaŭ ol vi mortigu vian edzon.

La sekvontan tagon, foipelinte vin per mia rigardo de timanto, vi ne venis.

Kaj vane mi serĉis vin ĉiuloke: nenie mi povis vin trovi.

Scias mi: vi serĉis bestokaptiston, kaj mi estis timema junulo — kaj ankoraŭ mi ne sciis la movon de kuraĝa dekstrobrako.

Vi estis nebridigita leonino, kiun kuraĝulo estis eltirinta per sangigitaj manoj el la kaŝejo — kaj vi ekamis lin pro lia vipo kaj pro la fortenco de lia rigardo.

Mi scias: en vi vivis pasiego, kaj pasiego estas nesatigebla — kaj ĉiunokte serĉas alian — la nekonatulon. . . .

Kaj — mi perdis vin.

— — —

Ĉu vi rememoras, malproksimumo mia, la momenton de nia lasta renkonto?

Tio okazis en lumplena salono de granda okcidenta urbo.

Tie, meze de odoro je pudro kaj blovo de ventumiloj, sur la brila planko respeguliganta enpenŝigintajn vizaĝojn kun hipokrita gajeco, — ni interrenkontis nin.

Kaj vi ne rekonis min.

Altkreska homo kun nigraj vestoj kaj kun diamantoj surfingre tenis vian manon — kaj malrapide vi sekvis la frapojn de laciga danco.

Kaj tiam rememoris mi la sovaĝan horon de Izmir'a nokto, kiam antaŭ mi vi rompis flekseblan korpon, por ludadi viajn sorĉeblajn dancojn de Oriento. . . .

Tio estis delonge, delonge. . . .

Sed vi ne rememoris pri mi.

Kaj al vi etendinte mian manon, vi ekridetis tiel, kiel ridetas ĉiuj virinoj de Okcidento — perforte kaj lace. . . .

Vi anstataŭigis la luman sonĝon de Izmir'o per la luksa salono de la malvarma urbo, kiel same vi anstataŭigis iam la varmegan vastaĵon de la dezerto per la polva revo de urba strato.

— — —

Kaj, kiam je la fino de l'vespero, v rekonis min kaj rememoris pri mi, vi donis al mi branĉeton de cipreso.

. . . Kaj ree en mi ekbrilis la terurego de travivitaj tagoj: *mi vidis sangon sur la folioj*. . . .

El „Sunaj fabeloj“.

El la bulgara tradukis S.



Portreto de N. Rajnov

B. Mitov

Nikolaj Rajnov, fama bulgara beletristo, historiisto de la arto kaj profesoro ĉe la Belarta akademio, estas naskita en vil. Kesarevo, regiono Gornoorehovska (sed iaokaze enskribita en Sofia) dum 1889 j. Li finis Pastran lernejon (seminarion) kaj la Belartan akademion (dekorativa kaj grafika fakoj) en Sofia; li estis ankaŭ fremdlande, vizitis kelkajn orientajn landojn. Profesoro je historio de la arto en la Belarta akademio Sofia, N. Rajnov konas la mitojn de la antikveco kaj de la okcidentaj popoloj, la legendojn kaj skribaĵojn de la mezepoko, plenaj je misticismo, tiel ankaŭ ilian artan perlaboron en la tuthomara literaturo, kaj li ĉerpas el tiu trezoro brilajn kaj imponajn viziojn kaj ideojn. Li estas tre ege zorgema por la formo kaj estas unu el majstroj de la bulgara lingvo. Li estas tre produktiva verkisto kaj skribis la jenajn librojn: Bogomilaj legendoj (1912) Vizioj el antikva Bulgario (1918) Libro por la reĝoj (1918) La okuloj de Arabio (1918) Sunaj fabeloj (1918) Inter la Dezerto kaj la Vivo (1919) Lumigilo (Torĉo) de la animoj (1921) Malriĉa Lazar (1922) Eternaj poemoj (1925) La ŝipo de la senmortuloj (1925) Fabeloj el tuta mondo (32 libroj) la kapitala verko Historio de la arto, en 12 tomoj (1931 kaj sekvantaj), por kiu funde kaj verve studis ĉiujn gravajn monumentojn, kiujn la homaro hereddonis al ni, kaj kiu havas vivan kaj kompreneblan skribmanieron, kaj multajn aliajn librojn.

STEFAN AT. BOBEV
lernanto, Bourgas

TREZORSERĈANTOJ

(idilio)

Bela somera nokto falis super la vilaĝo. La laboro sur la draŝejo ĉesis kaj ni, la petoluloj, kunvenis por ludado. Ĉar ne estas pli agrabla okupo ol kaŝludo sur la draŝejo en la mallumo de la somera vespero. Tiel gaje, tiel agrable estas, kiam ekkuŝinte sur la bonodora fojno, vi observas la kamaradojn, kiuj vin serĉas. Ankaŭ agrable estas kiam laca, ni kuŝas sur la herbo kaj fiksinte okulojn al la stelplena ĉielo, rakontas diversajn historietojn. Ni komencas revii kaj al ni ŝajnas ke ankaŭ ni estas bravuloj kaj herooj kiel tiuj en la fabeloj rakontitaj.

Tiun vesperon ni ankaŭ kunvenis, kaj la plej aĝa ekrakontis ian misteran rakonton pri pirataj trezoroj. Ni ĉiuj ple-natente lin aŭskultis. Mia patro, kiu estis sidinta apud ni, subite diris:

— He, ĉu vi deziros scii kiel mi estiĝis trezorserĉanto?

— Rakontu, rakontu! — ni komencis peti lin, forgesinte tuj pri la pirataj teruraĵoj. Paĉjo kviete komencis sian rakonton:

— Mi estis je via aĝo verŝajne. Ankaŭ tiam ni la infanaro tre ŝatis ludi vespere sur la draŝejo, kaj kunveni por rakontoj. Foje, kiam ni aŭskultis teruran fabelon, Bonĉjo, mia plej fidela amiko, nur unu jaron pli aĝa ol mi, kliniĝis al mi, mallaŭte kaj mistere ekflustris je mia orelo:

— Ĉi-vespere mi devas rakonti al vi gravajn aferojn.

Tiuj vortoj min forte scivoligis kaj ni senbrue rampis preter niaj enreviĝintaj kamaradoj al la stako da fojno kaj tie Bonĉjo komencis:

— Aŭdu, Peĉjo, mi rakontos al vi aferojn pri kiuj neniu devas scii. La sekreto devas esti nur inter ni. Promesu ke ne parolos!

Mi ekrigardis lin kolere, sed en la mallumo la vizaĝoj ne videblis.

— Se vi ne konfidus al mi, ne parolu! Mi eksilentis ofendita.

Ne koleru! — duonvoĉe rompinte la silenton Bonĉjo, — sed la afero estas serioza.

Mia scivolemo iĝis apogea. Mi atendis la daŭron.

— Hodiaŭ mi aŭdis ion de mia avo, — ekflustris Bonĉjo, — tute hazarde mi estis ĉe li, kiam li interparolis kun avo Nejko, la sama kiu estas eksvilaĝestro. Ili parolis pri la muelejo de Milko. Ĝi nun estas senhoma, kaj tie estas enterigita trezoro, la trezoro de mortinta muelisto Milko. Avo Nejko diris al mia avo la lokon. . . la ĝustan lokon kie estas ĝi enterigita. . . Kaj mi proponas, tiun nokton ni ambaŭ iri. . . ha, kion vi diros?

Kion mi diru! Vere, ne estas facilaĵo: meznokto, dezerta, senhoma muelejo, pri kiu oni rakontas tiom da teruraĵoj. Mi deziris nei. Sed kion dirus Bonĉjo. Li nomus min timemulo, ankaŭ povas preni alian kaj tiam. . . Ĉiuj min priridos. — Tiuj argumentoj sufiĉis por forigi mian heziton kaj ambaŭ ni komencis pripenson de nia nokta aventuro. Desur la ĉielo nin rigardis rideme la luno. Ni disigis, post kiam decidis kie renkontiĝos.

— — — — —
Silente, ne aŭdita de kiu ajn, mi eliris el mia domo, prenis pioĉon, longan bastonon kaj iris al la granda saliko, kiu estas inter nia korto kaj tiu de Bonĉjo. Nia hundo ekbojis, sed post kiam ekkonis min, eksilentis. Bonĉjo jam min atendis. Li tenis en siaj manoj feran rekon. Sen parolo, kiel fantomoj, sub la pala luna lumo, ni ekiris. La muelejo estas ekster la vilaĝo en salika arbareto. Dekiam ĝia posedanto, avo Milko, mortis, ĝi dezertis kaj en la vilaĝo oni rakontis teruraĵojn pri ĝi. Iuj estis vidintaj noktomeze la maljunulon ke vagas ĉirkaŭ la muelejo, gardante sian enterigitan trezoron. Li eĉ estis persekutinta paŝtistetojn. Tiuj onidiroj, famigitaj buŝ'al buŝe, timis ne malmultajn kaj ĉar rememoris ilin nun, en la malfrua nokta horo, mi ekstremis kaj jam komencis penti, pro kio konsentis veni kun Bonĉjo.

— Bonĉjo, ĉu vi scias kion oni parolas pri. . .

— He — respondis li — oni parolu! . . . Vanaĵoj. . .

Sed mi eksentis en lia voĉo notetojn de hezito. Jam ni eliris ekster la vilaĝo, sed verdirite, mia kuraĝo tute foriĝis. Mi iris timeme, kaj nur la fiereco ne permesis al mi returniĝi kaj alkuri hejmen. Ĉe ĉiu paŝo mi ĉirkaŭrigardis, ĉiu ombro min tremigis. Ni atingis la arbareton kaj mi kolektis kaj vokis la tutan mian kuraĝon je helpo.

Ni iris kun Bonĉjo premintaj unu al alia. Ĉi tie, en la arbaro, la lunradioj apenaŭ penetris, la arboj akceptadis terurajn formojn kaj kvazaŭ etendis manojn al ni. Mi eĉ aŭskultis, ke la koro de Bonĉjo ankaŭ batas maltrankvile.

Jen jam la muelejo, lumigita de la pala luno. La rompitaĵoj fenestroj terure mal-lumis kaj similis je okuloj de kranio. Nenia vivaĵo. Nur la rivero mistere plaŭdis ondetojn ĉirkaŭ la putrinta rado.

— He tien, ĉu vi vidas, Peĉjo, tiun blankan ŝtonon ĉe la saliko? — ekflustris al mia orelo Bonĉjo kaj mi jesis kape. — Avo Nejko diris, ke sub ĝi estas la trezoro. Tuj kiam ni ĝin levigas. . .

Timeme, ĉirkaŭen rigardante, ni iris

al la ŝtono kaj komencis laboron. Surde, mistere eĥis la frapoj en la dezerto. En la vilaĝo ekkriis kokoj. Subite el la muelejo terure ekkriis gufo. La alia bruo el interne preskaŭ min senmensigis. Mi lasis pioĉon kaj plenforte ekkuregis hejmen. Post mi iu min postsekvis. Mi timis returniĝi. Kaj ne scias kiel mi pasis la spacon inter la muelejo kaj la vilaĝo.

Mi rekonsciiĝis kun malvarmiga tuko sur la kapo, super mi mia panjo palpis mian frunton. Mire mi ŝin rigardis. Ĉio travivita al mi ŝajnis kiel malbona inkubo. Baldaŭ mi resaniĝis kaj eksciis, ke tiam post mi kuris Bonĉjo. Li ankaŭ estis malsana. Kaj kiam poste en ludado mi ekrigardis Bonĉjo'n, tuj mi remomoris la teruran nokton. . .

Mia patro eksilentis, enreviĝinta en memoroj.

— Sed, paĉjo, demandis mia frateto, — kial vi iris serĉi trezoron meznokte? Pli bone estus tage. . .

— He tiel, ĉar Bonĉjo aŭskultis de sia avo, ke nur meznokte la mortinta Milko ne gardas sian trezoron. Post la ekkrio de l'kokoj. . .

— Stefo, Peĉjo, venu! — eksonis subite en la mallumo la voĉo de mia patrino. Si nin vokis por vespermanĝo. . .

XIII ĝenerala pentrarta ekspozicio

La disvolviĝo de la bulgara pentrarto ni plej bone povas vidi en la sinsekvaj ciujaraj pentrartaj ekspozicioj de la Unuiĝo de la pentristoj en Bulgario. Ĝis nun la bulgaraj pentristoj ne posedis sian propran ekspoziciejon.

Dum tiu ĉi jaro, la 24-an de marto, estis solene inaŭgurita la propra salono de la bulgaraj pentristoj. Plej poste unu revo estis efektivigita. La salono estas majesta. Ĝi troviĝas sur strato „Rakovska“. En ĝi ankaŭ estas aranĝota dum la printempo ekspozicio de la nuntempaj francaj pentristoj, kiu estas atendata kiel vera kultura okazintaĵo.

La XIII ĝenerala ekspozicio estis malfermita per parolado de s-ro ĉefministro kaj ministro de publika instruado

prof. Dro Bogdan Filov. Kiel profesoro ĉe nia ŝtatuniversitato de arĥeologio kaj kiel historiisto de la bulgara arto, la nuna ĉefministro estas tre proksima al niaj pentristoj. Li konas tre bone la verkaron de ĉiu pentristo, esploris kaj observis ĝin. Pro tio lia parolado estis saturita per kono kaj kliniĝo antaŭ la faro de nia pentristo, kiu en tiuj maltrankvilaj tempoj kreas la kulturan kaj pacan progreson de nia lando.

La salono estas propra faro de la pentristoj mem. Kun ĝi ili povas fieri.

La bulgaraj pentristoj estas organizitaj en ses societoj, fonditaj sinsekve. En ĉiu societo eniras pentristoj, kiuj havas egalajn komprenojn por la arto.

La plej malnova societo estas tiu de la „Bulgaraj pentristoj“. En ĝi estis membroj la plej grandaj majstroj de nia pent-



Bulgara knabino, de Vlad. Dimitrov — Majstora rarto. Ĝia honormembro kaj fondinto estas la mortinta prof. Mrkvička, kiu donis tiom multe por nia pentrarto kaj kulturo.

Aliaj societoj estas „Nuntempa pentrarto“, Patria pentrarto“, de la „Sendependaj pentristoj“, de la „Sudbulgaraj pentristoj kaj de la „Novaj pentristoj“.

En la Unuiĝo de la societoj de la pentristoj estas membroj pli ol 300 bulgaraj pentristoj. Ili laboras obstine kaj donas daŭrajn kaj muĝajn verkojn.

La Unuiĝo estis fondita antaŭ dekkvin jaroj. De tiam ĝis nun kun laŭdinda obstineco kaj persisteco la pentristoj kolektis monon por konstrui sian domon kaj ekspozician galerion, kiu kostas pli ol 2,600,000 lv. Tiuj monrimedoj estis kolektitaj de kotizoj, de enirpago de la ĝeneralaj pentrartaj ekspozicioj, de l'venditaj bildoj, de gajnitaj konkursoj. Ĉiu pentristo estis devigita doni dek procentojn al la Unuiĝo de sia vendita bildo, tiel ankaŭ de ĉiu gajnita konkurso por monumentoj ktp. Ankaŭ estis donitaj procentoj de la enirpagoj de privataj ekspozicioj.

Tiel levo post levo estis kolektitaj la monrimedoj, per kiuj estis konstruita la



Angulo de la ekspozicio kun la bustoj de L. R. Moŝto Boris III kaj de Ŝ. R. Moŝto Ioanna

vasta galerio — fieraĵo de la ĉefurbo kaj unu granda faro de la bulgaraj pentristoj.

En la salono estas videblaj la bildoj de Ŝia Reĝa Moŝto princino Eŭdokio, kiu estas honora membrino de la Unuiĝo. Sur alia muro distingiĝas du bildoj de Vladimir Dimitrov — Majstora, unu el kiuj estas aŭtoportreto. Belaj estas la portretoj de prof. B. Mitov al la profesoro kaj verkisto Nikolaj Rajnov kaj al la verkisto, ĝisnuna prezidanto de la Unuiĝo de la bulgaraj verkistoj Dobri Nemirov. Preskaŭ ĉiu vizitanto rigardas daŭre la bildon „Senpluveco“ de P. P. Morozov.

La pentristinoj okupas ankaŭ gravan lokon en la ekspozicio. Ili inde konkuras al la pentristoj. La bildoj de Vera Lukova, Ruska Marinova, Mara Conĉeva, Marija Josifova kaj de la skulptistinoj Mara Georgieva kaj Vaska Emanuilova estas tre interesaj.

La skulptaĵoj estas dissemataj en la tuta salono. Estas ekspoziciitaj la novaj bustoj de la Reĝo kaj de la Reĝino, lasta skulptaĵo de prof. Andrej Nikolov. Ili estas laboritaj de marmoro. Interesan kapon de knabino donas la juna skulptisto M. Mihajlov.

Plej interesaj skulptaĵoj estas tiuj de Janko Pavlov, sola skulptisto nia humoristo kaj karikaturisto. Li nun ekspozicias skulptaĵon de la mortinta verkisto-dramaturgo St. L. Kostov kaj alian eĉ pli interesan kaj rimarkindan sub titolo „Terceto“ — ruso, bulgaro kaj serbo kiuj ludas je siaj naciaj instrumentoj kaj al ĉiu aparta persono estas donita karakteriza nacia traito kaj pozo.

En la verkoj de la bulgaraj pentristoj estas videblaj klare du tendencoj: unu de la realismo kaj alia de la modernismo. Ni tute ne volas kritiki la du tendencojn, sed ĉiu vizitanto povas fari por si mem la konkludojn pri la signifo de la du tendencoj en nia nuntempa bulgara pentr-kaj skulptarto. Ĉiu verko parolas por persona kaj sintezigita vivmaniero, sed ĝi estas rezulto de kreanta verveco kaj peno kiu meritas nian atenton kaj estimon.

La XIII ekspozicio ne venas kun grandaj pretencoj, sed ĝi notas novan progreson por niaj pentristoj. La plej grava fakto estas ke ĝi estos ligita kun la vivo de nia pentrarto precipe kun la bela ekspozicia galerio. Tio estas granda kaj notinda sukceso kaj progreso por la bulgara pentrarto kaj por la tuta bulgara kulturo.

Juan Sarafov

Albumo de Bulgaraj esperantistoj 1939

Aranĝis kaj eldonis: Belĉo Oktomvrijski

Enhavo:

1. Antaŭparolo de A. da.
2. Geografia skizo pri Bulgarujo de Emil Stratev.
3. Bulgarujo tra la jarcentoj — historia skizo de Geo Harŝev.
4. Bulgarujo — lando de turismo kaj kuracakvoj de Ivan Sarafov.
5. La Esperanto — movado en Bulgarujo de At. D. Atanasov.
6. Bibliografio de la Bulgara Esperanto — literaturo parto unua: libroj en Esperanto, de Emil Stratev.
7. Portretoj kaj adresoj de pli ol 400 bulgaraj esperantistoj.
8. 25 fotografiaĵoj de bulgaraj urboj kaj de bulgaraj Esperanto-kongresoj.
9. Karto de la Balkana duoninsulo.

Paĝoj 146. Formato 23.5/15. Prezo 50 bulgaraj levoj, 7 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Havebla de la eldoninto: SPIKTUR, Internacia Instituto, Alabin 50, Sofia, Blugarujo
Por Nederlando la Albumo estas havebla kontraŭ 1 guldeno de: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Den Haag, Poŝtĉekkonto 161626. Poŝtkesto 200.

Por Francujo — kontraŭ 20 fr. fr. de: Centra Librejo Esperantista, 11 rue de Sevres, Parizo (6).

Por Jugoslavujo — kontraŭ 25 dinaroj de: Administracio de „La Suda Stelo“, Slav. Brod.

NIAJ ALBUMOJ

Antaŭ kelkaj monatoj aperis en Ruse „Albumo-adresaro de la esperantistoj“, eldonita de s-ano Dimitr Ivanov. Iom poste aperis en Sofia „Albumo de bulgaraj esperantistoj“, eldono de Spikturnacia Instituto.

La albumo servas al la interkonatiĝo de ĉiuj pioniroj el urboj kaj vilaĝoj de nia lando. En ĝi oni trovas la portretojn de multaj personoj, konataj jam laŭnome el la paĝoj de niaj libroj kaj gazetoj; en ĝi la korespondemaj trovos por si konvenan kaj simpatian korespondanton aŭ korespondantinon; per la albumo la bulgara esperantisto povas prezenti la verdan bulgaran armeon al la ekstera mondo. Neesprimeblan plezuron ĝuas la esperantisto foliumante la ilustritajn paĝojn, el kiuj lin rigardas fizionomioj, fizionomioj. . . . Li ĝoje sentus fortan kaj nevideblan ligon inter si kaj tiuj reprezentantoj de diversaj sociaj tavoloj kaj profesioj, kulturoj kaj konceptoj.

La perioda eldonado de similaj albumoj fariĝis kvazaŭ tradicio de la bulgaraj esperantistoj. En 1923 aperis la unua albumo, eldonita de s-ano Ada. En 1929 aperis la dua — eldonita de s-ano B. Oktomvrijski. En 1939 aperis du verkoj, kiuj havas saman celon kaj pretendon, tamen, laŭ formo, aspekto, amplekso, enhavo kaj maniero de aranĝo, inter ili ekzistas granda diferenco.

Albumo adresaro de la esperantistoj—Esperanto“, 48-paĝa, f. 17×24 cm. Eld. Dim. Ivanov — Ruse. Kovrilo erare redaktita, tro ŝarĝe, senzorge kaj senguste ilustrita kvazaŭ paĝo el kriminala romano. Sur la internaj paĝoj de la kovrilo staras nesperte laŭ stilo kaj erare laŭ gramatiko redaktitaj reklamoj. En la albumo mem, post la portreto de nia Majstro, ni legas ĉefartikolon, en kiu la aŭtoro-eldoninto rakontas pri sia agado kiel kursgvidanto, aranĝinto de „memorplenaj ekskursoj eksterlanden“ kaj pri siaj bataloj „kontraŭ ĉiuj mizeraĵoj(?) kiuj celis misuzi aŭ uzi por siaj celoj Esperanton“ (??).

Sekvas informoj pri Ĉe-Instituto de

Esperanto, artikolo pri la lando de rozoj kaj centjaruloj de Iv. Krestanov kaj unu geografia karto de nia lando, en kiu oni disponis pri plena libereco, uzante la manusklojn en la komenco de land — kaj urbnoj (jugoslavujo, G. ĝumaja), la majusklojn en la mezo de vortoj (VaRŝec), miksante la esp. kaj latinan alfabeton (Kustendil, Dupnica), lasante flanke la variecon de literkarakteroj. La eldoninto presigis en la albumo la fotojn de bulgaraj kaj eksterlandaj samideanoj, la plimulto el kiuj neniam revis tiun honoron, aŭ almenaŭ neniam donis sian konsenton.

La nomoj de eksterlandaj s-anoj estas presitaj laŭ ilia nacia ortografio (Julio Baghy, Wilian Benson, Marcel Jaquet), kio ja estas ĝusta, malgraŭ ke en la esperanto-alfabeto mankas la literoj é, q, w, x, y. Sed kial li skribis nur la nomon de la eminenta esperantisto Hugo Stejner en esperanto anstataŭ Steiner. ?

De teĥnika vidpunkto la kliŝoj estas tre nesperte faritaj, la fotografaĵoj nekonvenaj por kliŝigo. Kelkaj el ili estas tre malnovaj kaj la personoj preskaŭ nerekoncibleblaj; ĉe aliaj la figuroj estas ĉirkaŭtranĉitaj kaj algluitaj sur papero, kio donas al ili tre malbelan aspekton. Anstataŭ uzi la belajn kaj pretajn preslitojn, la aŭtoro lasis skribi la nomojn kriple manuskripte — nova kontribuo al la malbela aspekto de la albumo.

Unuvorte, la albumo-adresaro de D. Ivanov, per siaj teĥnikaj, enhavaj kaj lingvaj eraroj ne estas granda kontribuo por la bulgara esperantistaro, kiel ankaŭ por la ĝenerala Esperanto-movado.

Albumo de bulgaraj esperantistoj, 1939, 146-paĝa, f. 16 × 21 cm. Eld. Spikturnacia Instituto-Sofia. — Bela eldonaĵo, kiun povas admiri ĉiu amanto de belaj presaĵoj. La simpla, artplena kovrilo agrable frapas viajn okulojn. Ne malpli bela, de tipografia vidpunkto, estas ankaŭ la interna titolo-paĝo. En la albumo ni legas kelkajn artikolojn de niaj plej konataj esperantistoj: antaŭparolon de Ada, artikolon de E. Stratev pri la geografio de Bulgarujo, artikolon

de Iv. Sarafov pri la naturbelaĵoj de nia lando, artikolon pri la enlanda esp. movado de nia senlaca prezidanto At. D. Atanasov, kaj artikolon de Em. Stratev pri la bibliografio de la Bulgara Esperanto-literaturo. La nomoj de la kunlaborintoj pruvas la seriozan rilaton, kiun la esperantistaro havis al tiu albumo.

La albumo mem enhavas fotojn nur de bulgaraj esperantistoj, ordigitajn laŭ urboj, regionoj kaj vilaĝoj. Pri ĉiu pli granda urbo estas donitaj mallongaj historio-geografiaj notoj. Ĉiuj kliŝoj estas egaldimensiaj, po kvar sur ĉiu paĝo.

En la aranĝo de la albumo s-ano B. Oktomvrijski aplikis zorgojn kaj teknikajn konojn. Li kreis belan rimedon por deca prezentado de Bulgarujo antaŭ la ekstera mondo, ĉar li ja scias, ke laŭ la nivelo de la presarto en iu lando oni pevas juĝi pri ĝia kulturo.


Cydra

Noto de la redakcio. Al la vortoj de s-ano Cydra ni devas aldoni: Ĉar la preparaj laboroj por ambaŭ supremenciitaj albumoj komenciĝis preskaŭ samtempe, la Bulgara Esperanto-Asocio intervenis en la afero kaj konsilis al s-ano D. Ivanov, kiu komencis pli malfrue ol „Spiktur“, ĉesigi sian laboron, ĉar samtempa eldonado de du similaj albumoj ne estas ebla por malgranda lando, kiel Bulgarujo, kaj ke ĝi malfortigus ambaŭ ilin. Malgraŭ tiuj konsiloj s-ano D. Ivanov daŭrigis sian laboron. La rezulto de tia manko de memdisciplino staras nun antaŭ ni: La albumo de s-ano Ivanov kiel ni vidas el la supraj linioj de s-ano Cydra ne povis atingi la nivelon de deca eldonaĵo kaj ke albumo de „Spiktur“ iom suferis de tiu ĉi dueco, ĉar, alie ĝi povus fariĝi pli granda kaj pli bela.

LOVEĈ—la urbo de la 27-a kongreso de bulg. esperantistoj

Loveĉ estas malgranda, belaspekta kaj pura urbeto, situita sur la du bordoj de la rivero „Os ŝ m“. Unika sur la tuta

de la ponto estas amaso da butikoj, en kiuj oni vendas diversaĵojn. Pitoreskaj rokoj, altkreskintaj siringarbetaĵoj ĉir-



La urba ĝardeno
en Loveĉ

Balkanduoninsulo kovrita ponto kunligas la ambaŭ partojn de la urbo. Ambaŭflanke

kaŭas la urbon. La rivero trairas serpente la rokojn.

Loveĉ estas fame konata, kiel antikva, roma fortikaĵo, pli malfrue dum la turka jugo ĝi estis ĉefurbo de la bulgaraj revoluciuloj kaj ribelantoj. Nun estas regiona urbo kaj nombras ĉirkaŭ 10,000 loĝantojn. Ĝi fieras pro sia gimnazio, ledista profesia lernejo, knabina amerikankoleĝo k. s.



Populara banko kaj legejo
„Nauka“, Lovec

Ĉiam belaspekta estas la urbo, sed belega estas dum majo, kiam la siringoj plene disfloriĝas kaj odorigas la aeron. En la ĉarma Loveĉ okazos la 27-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj.

La vizitado de la sama estas faciligita de modernaj kunligoj: fervojo, kiu kunligas la urbon kun la rivero „Danubo“ tra urbo Sviŝtov kaj kun la ĉefurbo Sofio, bonarangitaj ĉosejoj, sur kiuj konstante cirkulas aŭtobusoj, aŭtomobiloj kaj diversaj aliaj veturiloj.

Vizitu amase la 27—an kongreson de bulgaraj esperantistoj en urbo loveĉ dum julio 1940 kaj vi restos kun ĉiam plenaj bonimpresoj pri tiu unika kongreso.

Alliĝu senprokraste:

Pri detalaj informoj bonvolu turni vin al esperanto societo „Espero“, adreso:

Loveĉ, str. Târgovska 183 (Bulgarujo).

Направени сж постѣпки отъ Управителния съветъ на Съюза предъ Министерството на вѣтрешнитѣ работи за разрешаване конгреса, а сѣщо така — за пѣтуване по желѣзницитѣ съ 50% намаление. За резултата отъ горнитѣ постѣпки ще се съобщи на дружествата съ специално окръжно и въ единъ отъ следващитѣ броеве на списанието.

GEOGRAFIAJ SCIIGOJ PRI TURKUJO

40,000 mortviktimoj, 90,000 vunditoj, 50,000 detruitaj domoj, pli ol 2 milionoj da rifuĝintoj, — jen la terura rezultato de la tertrema katastrofo kiu suferigis Turkujon.

Turkujo nomiĝas oficiale: Türkiye Cünshuriyeti. Ĝia azia parto havas areon de 740,000 kvadrat-kilometroj kun loĝantaro de 15 milionoj, la eŭropa parto ampleksas 24,000 kv. km. kun loĝantaro de 1.3 milionoj. Nur dekono de la turka tero estas kulturata, ĉefe per tritiko kaj hordeo, sed ankaŭ per aliaj grenoj, per kotonono, sezamo, tabako, vino, fruktoj. Pli ol 80 procentoj de la loĝantaro laboras en la ter-kaj arbarkulturo, 8 proc. en mi-

noj kaj industrio, 5 proc. en komerco kaj trafiko, la resto en ceteraj profesioj. La loĝantaro estas plej parte osmana (turkmenida), kaj la religio mahometana.

Turkujo havas tri urbojn kun pli ol centmil loĝantoj: Istanbul (Konstantinopolo) kun 750,000, Ismir (Smyrna) kun 175,000, kaj la ĉefurbo Ankara (Angora) kun 130,000. Istanbul kaj Ankara havas universitatojn.

Turkujo estas de post 1922 respubliko, kun aŭtoritata registaro. Ĝi estas dividita en 63 vilajetoj (gubernioj). La standardo de Turkujo montras blankajn duonlunon kaj stelon sur ruĝa fono.

ESPERANTO TRA LA MONDO

Brazilo

En Rio de Janeiro la 6-an de decembro 1939, inaŭguris s-ro A. Couto Fernandes, membro, de la Kontrola Konsilantaro de la Katolika Societo „Radio Vera Cruz“, pere de ĝia stacio PRE. 2 (1460 m.) kurson de Esperanto, kiu funkcias ĉiumarde, je 22.40—23.00 h. Antaŭ kaj post la lecionoj la stacio disradias la esperantistan himnon kaj muzikon kun kanto en esperanto. La 15-an de decembro ĝi disradiis paroladon pri D-ro Zamenhof.

Kun la nomita stacio, entute nun tri brazilaj radiostacioj dissendas Esperanto-kursojn, nome:

Marde, je 22.40—23.00 Vera Cruz, Rio de Janeiro, (katolika), PRE 2 (1460 m.).

Ĵaŭde, je 22.50—22.55 Transmissora, Rio de Janeiro, PRE 3 (1200 m.).

Sabate, je 20.00—20.15 Radio Club de Pernambuco, PRA 8 (730 m.).

Hungarujo

La Hungara Ruĝa Kruco decidis uzi esperanton.

La Hungara Radio ofte kaj regule disaŭdigas en esperanto. Subtenu tiujn radio-disaŭdigojn multnombre skribante al la „Danuba Voĉo“ en Budapeŝto!

La nacia hungara Esperanto-kongreso okazos nunjare en Kalocsa. Esperanto-kursoj okazas en diversaj urboj.

Jugoslavujo

En Zagreb lernas nian lingvon ĉirkaŭ 500 personoj. En Jugoslavio niaj samideanoj estas precipe junaj homoj, gvidataj lerte kaj energie de la, ankaŭ juna, D-ro Ivo Lapenna. Post la Interkonsento inter D-ro Maĉek kaj Cvetkoviĉ, la perspektivoj por la Esperanto-movado en Jugoslavio estas tre bonaj.

Grekujo

Per oficiala cirkluero № 94,066 de 9. X. 1939, la Ministro de publika instruado rekomendas la fakultativan lernandon de esperanto en la mezaj kaj superaj grekaj lernejoj.

Irlando

La Irlanda Radio konstante disaŭdigas interesajn informojn en nia lingvo.

Litovujo

Per Radio Kaŭnas ĉiun duan merkredon estas sendata en Esperanto „Nia anguleto“, vespere je 21.15 laŭ Mezeŭropa Tempo, ondlongo 1961 m., do la 13-an kaj 27-an de marto ktp.

Ĉeĥo-Moravouj

Esperantistoj en protektorato Bohemio kaj Moravio daŭrigas sian laboron, sed membroj de Esperanto-Asocio povas esti nur tiuj, kiuj estas laŭ nacieco ĉeĥoj. Alinacianoj (germanoj) ne povas esti membroj.

Francujo

Spite de la cirkonstancoj, la instruado de Esperanto regule kreskas en la francaj lernejoj.

Universitato de Besançon: S-ro Garaudet, Porinstruista Lernejo, Neuvelles des La Charité (Haute-Saône) gvidas kurson kun 36 gelernantoj. La 16-an de decembro, la lernantoj organizis feston en Choye, kun plejgranda sukceso.

Universitato de Dijon: Malfermo de la ĉiujara kurso en la porknaba lernejo en Savigny-les-Beaune. Prof. s-ino Nuidan.

Universitato de Lille: Kurso de s-ino Arnaud, instruistino en la lernejo de Hénencourt.

Universitato de Rennes: En Quimper, en la seminarioj por instruistoj kaj por instruistinoj, du kursoj sub gvidado de s-ro Le Seach, 25 lernantinoj, 33 lernantoj.

Universitato de Tours: En Epineux le Seguin, s-ro Micard remalfermis kurson por siaj lernantoj.

La Réunion: S-ro Fournier, direktoro de la Liceo Le conte de Lisle en Saint-Denis (La Réunion) lernas esperanton kaj preparas gvidadon de kurso por siaj lernantoj.

Nederlando

En Nederlando nia movado estas de multaj jaroj firme engrundigita. Tie eĉ forta ventego, kiel la milito, povas skui la Esperanto-arbon, ankaŭ forŝiri kelkajn branĉetojn, sed la trunko radikas firme en la tero, kaj ĝi certe transdaŭros la nunan uraganon.

Multaj samideanoj estas mobilizitaj. En diversaj urboj funkcias esperanto-kursoj. En Bergen samideano Pascha instruas Esperanton al 32 infanoj kaj samideano Huisjes gvidas kurson por 30 mobilizitoj. En Zeist okazas kurso al mobilizitoj, gvidata de s-ro Bingen, en Schoonhoven s-no de Groot gvidas kurson por 43 soldatoj. Kurso de s-ano de Jong en Sneek komenciĝis kun 7 kaj kreskis ĝis 29 partoprenantoj. En diversaj urboj (Hago, Arnhem k. a.) diverstendencaj grupoj aranĝis Zamenhof-vesperojn bone sukcesintajn.

La 12-a Nederlanda Esperanto Kongreso estas entuziasme preparata en Arnhem.

Nederlando en la lastaj jaroj pli kaj pli fariĝis unu el la centroj de la Esperanto-movado. En Hago, kaj nome en ĝia preferata parto Scheveningen, apud maro kaj dunoj, troviĝas, krom „Heroldo de Esperanto“, la sidejo de la Esperantista akademio kaj de la Internacia Cseh-Instituto. Konata fakto estas ke la urbestro de Hago estas konvinkita amiko de Esperanto. Cento da Hagaj policanoj kaj multaj tramistoj parolas nian lingvon. Rotterdam fariĝis lastatempe la oficiala sidejo de SAT. Nederlando estas ankaŭ

la sidejo de la Tutmonda Junulara Organizo (TJO).

La Cseh-Instituto regule eldonas sian monatan gazeton „La praktiko“. TJO eldonas organon „La Juna vivo“.

Italujo

La hortabelo de la Esperanto-dissendoj de Itala Radio estas jena:

Ĉiusabate: Italaj turismaj kronikoj.

18.45—19.05 (MET) per Romo II (245.5 m.)

21.00—21.20 (MET) per 2 RO 9 (31,02 m.)
kaj per 2 RO 15 (25,51 m.)

Ĉiumarde: Resumo de la politika situacio.

3.05—3.20 (MET) per 2 RO 3 (31,15 m.)

2 RO 4 (24,40 m.)

2 RO 6 (19,61 m.)

Едно отъ най-добрите помагала за изучаване и усъвършенствуване на международния езикъ е Есперантски синтаксисъ отъ Д-ръ Зах. Захариевъ. Цена 22 лева. Необходимо помагало за всички, които желаятъ основно да се запознаятъ съ граматиката и структурата на езика, за да могатъ правилно да говорятъ и пишатъ.

Не пропускайте случая да си го набавите на крайно намалената цена отъ 22 лв.

САМО НА 10 ЛЕВА

Суми се превеждатъ чрезъ пощ. чекова с-ка № 3616 или чрезъ пощ. или герб. марки.

Поръчки до: „СПИКТУР“ межд. институтъ
50, ул. Алабинъ — София.

Редакцията на „Bulgara Esperantisto“ отправя горещъ зовъ до съидейниците, които владѣятъ перото, да изпращатъ оригинални статии, езикови въпроси, преводи на стихотворения и разкази, съобщения изъ есперантския животъ и др. По такъвъ начинъ ще се разнообрази извънредно много съдържанието на списанието. Редакционната папка за сега не разполага почти съ никакви материали. А така се затруднява и редовното излизане на органа.

ENLANDA KRONIKO

Sofia. Г-нъ Иванъ Аракчиевъ, досегашенъ директоръ на III мъжка гимназия въ София, е назначенъ за главенъ секретаръ на Министерството на народното просвѣщение.

Отъ бр. 1 на „Bulgara esperantisto“, съидейниците знаятъ вече, че г. Аракчиевъ, като директоръ на гимназията, бѣ председателъ на комисията, която произведе първия официаленъ изпитъ за даване право да се преподава езика есперанто. Съ своитѣ рѣдки качества като човѣкъ, педагогъ и администраторъ, г. Аракчиевъ оказа неоценима услуга на есперантското движение.

Като поднася поздравитѣ на цѣлокупното българско есперантско движение за високото отличие, което г. Аракчиевъ получава съ заемането на този високъ и отговоренъ постъ, Централниятъ комитетъ на Българския есперантски съюзъ и редакцията на „Bulgara esperantisto“ се ласкаятъ отъ надеждата, че г. Аракчиевъ и сега не ще забрави нашето движение, а въ кръга на своитѣ възможности ще оказва и занапредъ своето ценно съдействие за напредъка на есперанто у насъ.

Regulaj ĉiumerkredaj kunvenoj en la soceta domo, amase vizitataj. Ĉiu kunveno havas sian ĵurnalon parolatan, en kiu partoprenas granda nombro da samideanoj. La 20-an de marto s-ano Kiril Draĵev referis pri la verbo en esperanto kaj la sufiksoj igi kaj iĝi. La 27-an de marto s-ano Emil Stratev referis pri Lingva kompetenteco.

La komunaj vespermanĝoj de la Sofiaj intelektuloj okazas ĉiun lastan merkredon de la monato en la restoracio Slavjanska Beseda.

La 21-an de marto subite mortis en Sofia nia malnova kaj ĉiam bonhumora s-ano

Angelo Temelkov

kino-operatoro ĉe la Stata gelernanta kinoteatro.

Eternan pacon al li!

S-ro Ivan Arakĉiev, ĝisnuna direktoro de III knaba porinstruista gimnazio en Sofia, estas oficigita kiel ĉefsekretario de la Ministerio de popola instruado.

De № 1 de „Bulgara esperantisto“ la samideanoj jam scias, ke s-ro Arakĉiev kiel direktoro de la gimnazio estis prezidanto de la komisiono, kiu faris la unuan oficialan ekzamenon por kapablecrajto de la lingvo esperanto. Per siaj maloftaj kvalitoj kiel homo, pedagogo kaj administranto s-ro Arakĉiev faris netakseblan servon al la esperanto-movado.

Esprimante la gratulojn de la tuta bulgara esperanto-movado por la granda distingo kiun s-ro Arakĉiev ricevas per la okupo de tiu ĉi alta kaj respondeca posteno, la Centra komitato de Bulgara Esperanto Asocio kaj la redakcio de „Bulgara esperantisto“ esperas, ke ankaŭ nun s-ro Arakĉiev ne forgesos nian movadon, sed laŭeble li donos ankaŭ estonte sian ŝatatan kunhelpon kaj subtenon por la triumfo de esperanto en nia lando.

La 3-an de marto nia bibliotekisto s-no Svilen Sokolov el Sofia edziĝis. Korajn gratulojn al la nova familio!

Излѣзе отъ печатъ

„ПРАКТИЧНА

ГРАМАТИКА на ЕСПЕРАНТО“

отъ Емиль Стратевъ

одобрена отъ Българския есперантски съюзъ съ протоколъ № 23. отъ 4. априлъ 1939. год. Необходимо ржководство за всѣки новъ и старъ есперантистъ.

ЦЕНА 6 ЛЕВА.

Доставя се отъ „СПИКТУР“ международенъ институтъ — 50, улица Алабинъ — София
Приематъ се пощенски или герб. марки

Pirdop. — La 19. III. 1940 s-ro Iv. Krestanov paroladis pri la naciaj lingvoj kaj esperanto en la loka ŝtata laktista lernejo antaŭ la kursanoj sub la prezido de la direktoro s-ro inĝ. agr. N. Dimov. Granda entuziasmo.

Loveĉ. La 29-an de marto nia samideano Radoslav K. Triĉkov parolis en la salono de la legejo „Nauka“ („Scienco“) je temo: La internacia lingvo esperanto en servo de Bulgario kaj de la bulgaroj. La parolado estis amase vizitita kaj aplaŭdita.

La kultur-kleriga societo „Espero“ en Loveĉ prezentis en la salono de legejo „Nauka“ la 30-an de marto la dramon „Himno de la mizereco“ de Sofia Belaja kun tre bona vizitado. La enspezo estas por la fondo-kongreso de Bulg. Esp. Asocio en Loveĉ. Bone ludis David, Icko Fedja kaj Sonja.

Por la bona organizo de la 27-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Loveĉ la loka kulturkleriga societo „Espero“ laboras tre aktive.

Varna. Post la fino de nia verda semajno, la kurso por komencantoj vigle funkciis.

La 31-an de decembro oni aranĝis amuzvesperon, okaze de la alveno de la nova 1940 jaro. Dum la tuta nokto oni bonege amuziĝis en amika verda rondo.

La 24-an de februaro la societo aranĝis amuzvesperon en la salonego de la Macedona domo kun riĉenhava literatura kaj amuziga programo. La teatra trupo de la societo prezentis la teatraĵon „Ĉiuj civilizigas“, komedio duakta. La salonego estis plenplena kun samideanoj kaj amikoj de nia ideo.

La 1-an de marto oni solene fermis la kurson por komencantoj.

La 5-an de marto estis malfermita kurso por progresintoj.



Ce-metoda kurso de samideano

Georgi Hr. Dimov en Varna

La 6-an de marto oni legis referaĵon je temo: „Kio estas Esperanto?“ antaŭ la kunveno de la laborista junulara societo, kie antaŭ kelkaj tagoj oni fondis esperantan sekcion.

La 7-an de marto s-ro Vitali Julzari legis antaŭ la mikrofono de Radio Varna je temo: „Kultura kaj ekonomia signifo de Esperanto.“

Централниятъ комитетъ на Българския есперантски съюзъ отново отправя енергиченъ позивъ до българскитѣ есперантисти, че тѣ трѣбва да положатъ върховни усилия за събиране на абонаменти и членски вносъ. Трѣбва да отбележимъ, че касата на Съюза е праздна и затова органътъ „Bulgara esperantisto“ излиза не на време Нѣщо повече дори, ако това положение продължава така, органътъ може да спре окончателно. За да не се дойде до това отъ никого нежелано положение, ние повтаряме: Съидейници, на работа!

La 20-an de marto oni legis referaĵon antaŭ la laborista kunveno je temo „Esperanto kaj la junularo“.

Oni regule legis antaŭ ĉiu leciono ĝis la fino de la kurso referaĵojn pri Esperanto antaŭ la kursanoj.

En la semajna ĵurnalo „Ĉernomorec“ aperas esperanto-rubriko kun tradukoj de Esperanto.

Malgraŭ la malvarmo, la albatranoj dimanĉe ekskursas al la proksimaj ŝirkaŭaĵoj de nia urbo. La verdaj varnaroj senlace marŝas sur sian vojon.

Geedziĝo. La redakcio de „Bulg. Esperantisto“ ĝoje sciigas, ke nia samideano s-ro Georgi Ĥr. Dimov el Varna, prezidanto de E-to societo „Albatro“, edziĝis la 3-an de marto kun la simpatia f-ino Vera St. Vraĉeva el Varna. La redakcio bondeziras al la nova Esperanto-familio feliĉon kaj prosperon en la vivo!

Aleksandr St. Dragiev (Ŝerca amo) naskiĝis la 14-an de septembro 1910 j., mortis je 30. I. 1939 j.

Li lernis esperanton dum 1929 j. kaj de tiam li estis aktiva membro de „Albatro“. Li ankaŭ estis membro de la kon-



trola komitato, kaj dum 1937 — sekretario de la societo. Li presis en niaj kaj

fremdaj esperanto revuoj multajn humor-rakontojn, estis kunlaboranto en la murkaj viv-gazetoj, aranĝitaj de la membroj de „Albatro“.

Ŝercemulo estas morta

Ridi, Pagliaccio I...

Ridu ŝercemul', sen fin',
portu gajon al amikoj
kun obstin'!

Ne ĉesu via ŝerc' instigi,
humoron krei, refreŝigi,
voki nin!

Venis zorgoj kaj domaĝ'.
cedis iuj de l' posteno
sen kuraĝ'.

Sed vi forigis la ĉagrenon
per gaja rid' kaj ŝerc-mieno
sur vizaĝ'.

Brave sonis via rid'
vigliganta per espero
Kaj per fid'.

Kaj ŝajnis ŝerco la danĝeroj
kaj zorgojn igis malaperi
via sprit'.

Ĉu dorlotis vin la sort',
ke vi ŝercis gaj-abunde
ĝis la mort'?

Vi kaŝis en la brust-profundo
nekuraceblan akran vundon
eĉ sen vort'!

Orfas la amika rond',
mutas la ridinta buŝo
sen respond'.

Sub ter' la ŝercemulo kuŝos!...
Kaj kvazaŭ korojn plu ne tuŝos
gaja ond'.

*

Esprimante al la geanoj de „Albatro“ miajn kondolencojn okaze la morto de la simpatia juna samideano Saŝo, mi dediĉis la supran versaĵon al lia memoro restonta en viaj koroj.

v. Krasimir, Provadijŝko.

Miti

En la redakcio estas ricevita

La jarlibro de I. E. L. 1940: unua parto

La dua parto, kies enhavo estos la Landaj Raportoj, Lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton, alia propaganda informo (eble ankaŭ nova fakvortaro) kaj ŝanĝoj en aldonoj al la Delegitaro, aperos en la aŭtuno.

Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de I. E. L. Bazaj kotizoj: MJ, 4 ŝil. anglaj; MA, 8 ŝil.; MAH, 13 ŝil.; MS, 25 ŝil. En kelkaj landoj ekzistas specialaj kotizoj en la landa valuto. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ ĉe Landaj Ĉefdelegitoj kaj Perantoj.

Deziras korespondi: Cetina Josip, str. Gorjanska № 10, ZAGREB, JUGOSLAVIO

ОТКРИВА СЕ ПОДПИСКА ЗА ЗАПИСВАНЕ АБОНАТИ НА УЧЕБНИКЪ ПО ЕСПЕРАНТО

по директната (говорна) метода, съ 316 картини въ текста,
отъ Д-ръ ЗАХАРИ ЗАХАРИЕВЪ

Отдавна се чувствуваше нуждата отъ второ издание на общопознатия учебникъ по есперанто по нагледната говорна метода на Д-ръ Захари Захариевъ, първото издание на който е отдавна изчерпано. По своето разнообразие, нагледностъ и живостъ на уроцитъ, съ голъмото число картини къмъ текста, учебникътъ по Есперанто на Д-ръ Захариевъ е най-удобното помагало за бързо и лесно изучаване на международния езикъ. Имайки предвидъ това, книгоиздателство „БРАТСТВО“ пое върху себе си задачата за преиздаването му. Докато първото издание струваше 50 лева, сега книгоиздателство „Братство“ го пуска по крайно намалената цена 20 лева.

Тия съидейници, обаче, които се абониратъ предварително за учебника, и внесатъ абонаментната сума най-късно до 20 май т. г., ще иматъ учебника само за 15 лева. Освенъ това, всѣки, който запише десетъ абоната и внесе сумата 150 лева, получава единъ екземпляръ безплатно. Съидейници, подпомогнете издаването на този тъй практиченъ и необходимъ за успѣха на нашето движение учебникъ по Есперанто

Адресъ: КНИГОИЗДАТЕЛСТВО „БРАТСТВО“ — СЕВЛИЕВО. Пощ. чек. с-ка 2201.

„BULGARA ESPERANTISTO“ —
monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.
Adreso: 50, str. Aabin, Sofia, Bugarujo.
Poŝtĉekkonto: 1133

JARABONO: Enlande — 20 bugl. le-
voj. Eksterlande—4 respondkuponoj aŭ
egalvaloro.

Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon
RES REDAKTORO P. JORDANOV

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ“ —СОФИЯ — ESPERANTO-PRESEJO „HUDOJNIK“ — SOFIA-2